




La Insulo de Amikeco



Ĉe l' koro de arbaro verdega kaj profunda,
vivis bestaro bunta, diversa kaj senĉena.



Rivero tie fluis, trankvila kaj abunda...


Meze de ĝi: insulo,
je foliaro plena.



Kaj tie do la bestoj vivadis, ĉu en paco?
Ne vere... Ofte ili kvereladis sen fin'.



Aŭdiĝis nur bruego kaj krio kaj minaco...
Senlace, la leporon postkuris la lupin'!



La pego
tamburadis,
matene jam
fervoris...





Kaj jen la urso
grumblis "Malsato
ventron boris!
Kondutas la abeloj
avare kaj ĉikane!"



La vulpo, fajne ruza, kaj la grumblema melo
pri aĉa tertrueto disputis en duelo.



Sekve, la loĝantetoj de la profunda tero
– la talpoj, la insektoj – taksis en konsidero...







Male, sur la insulo, troviĝis du amikoj:
Alcedo la fiŝisto, kaj Regolo la karul'
kiel du fratoj vivis, gaje inter salikoj,
pinoj kaj poploj. Ili flugis super la insul' ...



...matene, kunkantante en la ĉielo klara.
Ĉiu okupon sian prizorgis kun atento:
Alcedo fiŝojn kaptis, rapida, senerara.



Regolo, intertempe, per saĝa diligento,
serĉis en verda herbo semetojn por ekmanĝi.



**Kelkfoje ambaŭ sidis trankvile sur pinbranĉo
Simple por la plezuro babilon interŝanĝi.
Ja vere, ĉiu tago similis al dimanĉo!**



Ĉe la arbaro-rando, en foliara subo,
troviĝis ĉarma loko celita por pikniko,
kun kelkaj tabloj, benkoj, tri ujoj por la rubo:
ja ĉio restu pura laŭ bonkondut-logiko.



Sed ve! La homoj ofte ne tiom estas saĝaj!
Tro plenis la rubujoj, kaj kio do okazis?
Ĉie videblis ruboj, manĝaĵaj kaj pakaĵaj,
boteloj disrompitaj kaj ĉio do fatrasis!



Somero jam envenis. La suno ve varmegis!
Varmis pli ol en forno.



Kaj tie kuŝis dise
pecetoj de botelo, kiuj sunardon vekis...
Ekflamis seka herbo! La sekvo iris mise:



La vento per la flamoj
ankaŭ arbojn bruligis!







Sed tiam la kastoroj, trankvile laboremaj,
konstrui helpan ponton diligente sin dediĉis.



Fuê de l'fajro, çiu transiris sur l'insulon !



De tie ili vidis senhelpe la arbaron
brulantan. La vidaĵo terura la okulon
larmigis tuj al ĉiuj, ŝtonigis ĉies faron.



Premitaj en la koro, senmove ĉiuj staris,
escepte pri Alcedo: li plongis en riveron,
kaj flugis al la fajro, fulmsage temeraris...



...faligis tri gutetojn, spitante al danĝero,
ankoraŭ kaj ankoraŭ por celon tuj atingi,
sentime pri la flamoj!



Sed lin aliaj mokis:
"Ĝi estas draka fajro: ne eblas ĝin estingi!"



Alcedo tiam haltis, al ili ĉiuj vokis:
"Eble mia kontribu' ne estas tre utila,
sed devon mi plenumas prenante mian parton!"



Flugis li, kaj reflugis super la akvo brila
Utiligante tiel sian lertan flugarton...



L'insulon superflugis Regolo reganteto,
kriante ege laŭte... Admoni li kuraĝas:
"Rigardu vin, stultuloj, en plena malimpeto,
dum nian arbaregon fajraĉo prisovaĝas!
Obstine kaj antaŭen! Nur rekte kaj kuraĝe!
Ne ĉion ni jam perdis! Vekiĝu do finfine!"



La krio skuis ilin rapide kaj kontaĝe.
Kastoroj ĉenon formi ordonis kaj sentime
tuj malsekigi l'branĉojn, ke ili ne ekbrulu!




Ĉiuj per sia beko, sia faŭko, aŭ la vost',
eĉ orel', inundegis, malsekigis plu kaj plu...





...dum restis de l' arbar' nur trunkoj kaj nigra ter'...



Kunvivi oni devis, unuigintaj pace...
Tro etis la insulo por ĉies malkontento!
Pri nestoj la bestaro repensis nun tenace,
kaj truoj kontraŭ pluvo, por ŝirmo de la vento.



Tunelojn belajn
fosis la vulpo
kaj la melo,
loĝejojn por
musetoj, erinacoj,
leporoj!





Abeloj ĉiujn nutris per sia dolĉmielo.



La urs' konstrui domojn helpis al la kastoroj.



Ekflugis birdoj serĉi la nuksojn kaj la berojn,
tra kampoj ĉirkaŭantaj kaj apudaj arbaroj.



La strigo kaj la
pego kolektis
la lignerojn,
dum apro
elterigis
radikojn el
herbaroj.





... ili rakontis
ĉion,
kunvene
en libero...
Atente la
infanoj
aŭskultis,
kun volonto,
rakontojn
pri estonto,
kaj nova
vivespero.



En la arbar' la talpoj, insektoj kaj la vermoj,
vidante la konkordon, eliris el profundo...
Kaj helpi ili volis, do zorgis pri la ĝermoj,
akvumis ĉiujn semojn, plugante ĝis abundo.



Kaj vidu: jaron poste, la verdo jam aperas,
folioj multaj kreskas, l'arbaro reproduktas.



La bestoj do revenis por loĝi sur la tero,
unue la plej fortaj, kaj poste — la cetero.



Ho, kiel ĝojis ili retrovi la konturojn
de l'hejmo, kie ili plenkreskis kun espero...
Ŝanĝiĝis ĉio multe, sed ili trovis spurojn
de la arbaro praa, antaŭ la fajrkolero.

Neniam el memoro foriros tiu sceno,
renkonte sur la kara insul' de amikeco,
kaj ĉiujare ili iris por l'datreveno,
por kune plu festegi kaj diri kun apreco:



“Ĉu vi memoras, kiom ni timis en angoro?
Kaj kiel ni batalis kontraŭ la fajro foje?
Ni ĉion povas kune, forte en kunlaboro!”

Alcedo kaj Regolo
rigardas ilin, ĝoje.



La Insulo de Amikeco

Fablo verkita kaj rakontita de Sylvain Lelarge
inspirita de la sudamerika legendo pri la kolibro

Ilustraĵoj: Márta Horváth

Fotoj: Pál Kis

Filmredaktado: Katalin Kováts

Traduko al Esperanto: Nicola Ruggiero

Voĉo: Sylvain Lelarge

Libera por uzoj familia kaj lerneja

Filmita versio en YouTube >

<https://www.youtube.com/watch?v=auXap706gYk>

Enkonduketo de la aŭtoro (Sylvain Lelarge – instruisto de la franca en Nederlando)



Kiam oni petis min rakonti fablon al infanoj aĝaj de 4 ĝis 6 jaroj en franca lernejo en Nederlando, mi volis paroli kun ili pri la solaj aferoj, kiuj helpas okaze de katastrofo: solidareco, kolektiva agado kaj espero. Mi inspiriĝis de la legendo pri la kolibro, kaj desegnis la rimedojn por ĉi tiu teksto tiel, ke ili estu libere alireblaj por ĉiuj kaj facile kundivideblaj: sufiĉas unu klako por ludi la videon, kaj la PDF-dokumento estas legebla kvazaŭ libro. Ĝi estas ankaŭ presebla.

Versioj en diversaj lingvoj disponeblas (vidu www.talenvoortalent.nl/iledelamitieLangues.pdf). Se vi ŝatus helpi disvastigi ĉi tiun rakonton per bona traduko al alia lingvo, bonvolu kontakti min, kaj ni vidos kiel ni povas adapti ĉi tiun materialon por tiu lingvo. Se vi ŝatus subteni ĉi tiujn projektojn per modesta donaco, ni estus tre dankemaj > www.revolut.me/slelarge (bonvolu menciigi 'île de l'amitié').

Mi ŝatus esprimi mian koran dankon al mia edzino Katalin, kaj al niaj hungaraj amikoj Márta kaj Pál, kiuj ebligis ĉi tiun tutan projekton. Kaj kompreneble Nicola Ruggiero, kiu tradukis al Esperanto!

Sugestoj por gepatroj kaj geavoj:

Se ĉi tiu fablo plaĉis al vi kaj al viaj infanoj aŭ genepoj, jen kelkaj sugestoj:

- Presu la PDF-dokumenton por havi paperan ekzempleron
- Kune legu la fabelon, klarigante ajnajn novajn vortojn
- Ludu ĝin kiel mallongan teatraĵon
- Demandu la infanojn: kia besto vi estas en la arbaro? Kun kiu vi kverelas antaŭ la fajro? Kial? Kion vi faras por la grupo post la fajro? Kun kiu?
- Faru ion praktikan kun ili por zorgi pri nia medio – aŭ pli ĝuste dirite, ilia – ekzemple, kolektante rubojn kune sur la strato aŭ en parkoj (uzante sakon, gantojn aŭ rubkolektilojn) kaj metante ilin en rubujon...

Rimedo:

- La ilustrita esperantalingva teksto: www.talenvoortalent.nl/lainsulodeamikeco.pdf
- La esperantlingva video ĉe YouTube: <https://www.youtube.com/watch?v=auXap706gYk>
- La esperantlingva teksto sen ilustraĵoj: www.talenvoortalent.nl/lainsulodeamikecoTeksto.pdf

Tiujn ĉi rimedojn oni rajtas libere uzi en la familia rondo kaj en la lernejo.

Ili tamen estas sub kopirajto:

La teksto: © 2025 – Sylvain Lelarge

La bildoj: © 2025 – Márta Horváth

La traduko al Esperanto: © 2026 – Nicola Ruggiero

Kontakto: contact@talenvoortalent.nl

NB por tiuj kiuj konas la diferencon inter kuniklo kaj leporo ☺ : jesja, la besto montrita sur la bildoj estas kuniklo, kiu loĝas subtere, dum ĝia kuzo, la leporo, multe plus granda, aliforma kaj kun nigraj orelopintoj, 'nestas' surkampe. Sed la rimo inter 'leporo' kaj 'kastoro' estis tro bela. Se infano rimark(ig)as la malkongruaĵon, estas bela okazo gratuli lin aŭ ŝin pro la bona kono de la naturo, kaj havi interesan diskuton!

